

Heinrich Heine,
Diano

tradukita de Manfredo Ratislavo

Tia masa karna mola
de kolosa virinec'
estas al mi sen spitec'
nun lasita laŭ la volo.

Se mi estus alirinta
ŝin per ardo kaj pasi',³
tiun faron pentus mi!
Ŝi min estus bateginta.

Kio kolo, kia sino!
(Mi ne vidis alten pli.)
Mi translasas min al Di',⁴
subiĝonte al la ino.

*Traduko de la Germana poemo "Diana" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-02-14.*

MR-033-2 / Arg-204-406 (2004-03-06 14:13:01)

³aŭ:

ŝin en ardo kaj pasi',

⁴aŭ:

Mi konfidas min al Di',
min lasonte al la ino.